

La irlanda: subkaŝita lingvo

29a jarkolekto - julio 2008/07
Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Silentas
voĉo popola**

**Kreditkrizo
daŭras**

**La juda ŝtato
– 60-jara**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

La juda ŝtato – 60-jara

10

La juda ŝtato Israelo estas unu el la plej ofte menciitaj lokoj en internaciaj gazetaraj, televido kaj aliaj mon-daj amaskomunikiloj. Se surteriĝus gasto el Marso, tiu emus kredi, ke temas pri granda potenco, simile al Usono, Rusio aŭ Germanio.



Feliĉan datrevenon!

13

Ĉi-jare Bruselo festas la 50an naskiĝdatrevenon de sia plej granda fiereco-simbolo, Atomiumo. Tiu ĉi impona monumento estas konstruita por la Internacia Ekspozicio de 1958, simile al la Eiffel-turo en 1889. Laŭ la planoj Atomiumo restus dum nur ses monatoj. Tamen preskaŭ 50 jarojn poste ĝi plu ekzistas: la monumento fariĝis tiel populara, ke oni decidis lasi ĝin.



La sorĉistin-persekutoj

20

De la 14a jarcento kaj dum la sekvaj tri jarcentoj, furiozis tra la okcidenta kristanaro la tiel nomata persekutado de sorĉistinoj, kultura kaj socia fenomeno kompleksa kaj karakterizita de perforta subprema aktivado en multaj landoj. Pri la ĉasado de sorĉistinoj aŭ pri sorĉistinoj ĝenerale oni diris ĉion kaj la malon.



FOTO DE LA KOVRILO (D)HNR85

politiko

BRITIO	8
Nigraj tagoj por Brown	
IRLANDO	9
Nova ĉefo, nova aŭroro	
ISRAELO	10
La juda ŝtato – 60-jara	

moderna vivo

FUTBALO	12
Punŝoto	
SOCIO	12
Saluton!	
BELGIO	13
Feliĉan datrevenon!	
AUTORO-RAJTOJ	13
Fotilo-kaptilo	
ALBANIO	14
Silentas voĉo popola	
LOĜADO	14
Premas prezoj	

ekonomio

BANKOJ	15
Kreditkrizo daŭras	

lingvo

IRLANDO	18
Subkaŝita lingvo	

arto

SERBIO	19
Malnova monumento de la serba kulturo	

spirita vivo

SORĈISMO	20
La sorĉistin-persekutoj: reirigardo kaj reinterpreto	
TEOLOGIO	21
Pluiras, sed laŭ rifoj, la dialogo inter judoj kaj la katolika eklezio	

libroj

Nigra apokalipso	22
Nevideblaj mondoj	23

eseo

Ĉu ŝtormo en tetaso – aŭ en ambono?	24
---	----

> Abonoj	4
> Enkonduko	5
> Leteroj	6
> El mia vidpunkto	7
> Anoncetoj	27

► Rekte al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			LA JARO aere		
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso	
Argentino	EUR	23	27	13,8	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5	9
Britio	GBP	34	37	20,4	4	6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5	9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5	9
Danio	DKK	365	395	219	40	70
Estonio	EUR	25	29	15	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5	9
Grekio	EUR	45	49	27	5	9
Hispanio	EUR	45	49	27	5	9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5	9
Hungario	EUR	25	29	15	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860	1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9	15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5	9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5	9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5	9
Kroatio	EUR	25	29	15	5	9
Latvio	EUR	25	29	15	5	9
Litovio	EUR	25	29	15	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	33	37	19,8	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	390	430	234	45	71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10	18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5	9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5	9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5	9
Slovakio	EUR	25	29	15	5	9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5	9
Svedio	SEK	460	495	276	49	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5	9
Usono	USD	69	75	41,4	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya , Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzler@tiscalinet.de
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- > **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: novi-respond@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.

- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasiso, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gd-dewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 6e PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalininograd, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluwin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Subpremo lingva

Pro la nuna konflikto en kaj pri Tibeto subpremo de lingvoj denove ŝoviĝis en fokuson de diskutoj. Estas absurde, ke en tibetaj lernejoj kaj universitatoj oni povas lerni nur ĉinlingve, pro kio tibetanoj estas devigataj adopti ĉinajn normojn kaj vivmanieron. Tibetaj intelektuloj, kiuj volas studi sian propran klasikan literaturon, eĉ tion devas fari per ĉinlingvaj tradukoj. Tibetanoj tial parolas pri kultura genocido kaj postulas, ke Ĉinio ĉesu subpremi la tibetan lingvon.

Totalismaj ŝtatoj uzas la rimedon de lingva subpremo por siaj diktatoraj celoj. Ankaŭ en Sovetio ĉiuj civitanoj devis uzi la rusan lingvon, ĉar tiel la sekreta servo povis pli bone elspioni ilin. Sovetio disfalis kaj nun la diversaj etnoj denove uzas siajn lingvojn; sed Ĉinio ankoraŭ estas totalisma regno kaj ne permesas lingvan aŭtonomion.

Subpremo de lingvoj okazas ĉiutage ĉie ajn en la mondo, ankaŭ en Eŭropo. Formale en Eŭropa Unio (EU) ĉiuj 23 lingvoj estas egalrajtaj, sed la praktiko estas alia: superregas la angla. EU-komisiono prezentas dokumentojn nur en angla, kaj por tio uzas trukon: ĝi deklaras eĉ gravajn tekstojn simple „laborpapero“ aŭ „anekso“, kiujn laŭ la reglamento oni ne devas traduki en aliajn lingvojn. Germana parlamento en Berlino tial jam de monatoj ne traktas kaj resendas ĉiujn tekstojn al Bruselo, se ili ne alvenas en germana lingvo. Nun Ger-

manio, Aŭstrio kaj la germanlingvaj regionoj en Italio, Belgio kaj Rumanio oficiale protestis ĉe EU kontraŭ diskriminacio de germana lingvo, atentigante ke parolas ĝin 100 milionoj da homoj – plej granda lingvogrupo en EU. En deklaro ili argumentas: „Se EU volas krei pli da proksimeco al civitanoj, ĝi devas certigi, ke la homoj komprenas ĝin.“

Sed germanoj estas tiukampe nekredindaj, ĉar ili ĉiamaniere akcelas uzadon de angla lingvo, kiun oni parte instruas jam en infanvartejoj ... La germanoj mem subpremas sian lingvon per abunda uzado de anglaj vortoj. Dum vizito de germana ministro pri eksterlandaj aferoj en Moskvo lia rusa kolego Sergej Lavrov (kiu bone scias la anglan) dum gazetara konferenco albojjs germanan ĵurnaliston: „Kial vi parolas angle? Ĉu tio estas la tutmondiĝo?“ Jen la ambiguelo de Germanio koncerne la usonanglan lingvon: oni lamentas pri malatento de la propra lingvo, sed akceptas senlamente kaj eĉ favoras la maljustecon, ke germanoj devas lerni la tutmondiĝlingvon, dum usonaj kaj britaj studentoj devas lerni nenian fremdan lingvon. Ĉu vi komprenas tion?

Sincere via



Stefan MAUL



Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzojetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Flankeniro al la ruĝo

Vladimir Lemelev en sia *Lastaj opinioj pri la origino de vivo* (MONATO 2008/4, p. 12-13) falas en la kaptilon serĉi alian teorion, se la preferata teorio montriĝas nebla. La ideo, ke la universo komenciĝis per la Granda Eksplozo antaŭ 13 miliardoj da jaroj, estas ne fakto, sed nur teorio, kiu pli kaj pli iĝas nedefendebla, ĉar ĝi generas la neceson de fantaziaj teorioj, kiel „malhela energio“ kaj „subita amplekseco“. La Granda Eksplozo dependas de la arda kredo, ke la flankeniro al la ruĝo en la spektroj de kosmaj korpoj nepre indikas la rapidon, per kiu la korpo moviĝas for de ni. Ne ĉiu astronomo kredas tiun teorion. Ekzemple: observoj indikas, ke kvazaroj ne estas tre foraj, sed ili estas asocioj de ne tro foraj galaksioj. Mi mem kredas, ke la lumo, kiun ni vidas el la kvazaroj, venas el jonoj, kiuj moviĝas rapide al la grandega negativa ŝargo de la kvazaro, kiu fine kreskas en galaksion. Do, se la universo ne havas komencon nek finon, estas sufiĉe da tempo por ke vivo komenciĝu almenaŭ unu plian fojon. Mi ŝatas la ideon de panspermio.

Henry BROADBENT
Aŭstralio

Reduktitaj al stereotipoj

Jomo Ipfelkofer en *Kaptukoj – kaj kapdoloroj* (MONATO 2008/6, p. 11) skribas: „Tia decido plifortigos la senton ĉe multaj islamanoj, ke ili estas malbonvenaj kaj repuŝataj.“ Tio eĉ pli veras en Francio, kie estas leĝo pri laikeco kaj multe da maltoleremo, sed kio ĉefe impresas, estas, ke tiuj virinoj estas reduktitaj al stereotipoj. Oni vidas tiujn virinojn ne kiel individuajn personojn, sed kiel konceptojn, kaj rifuzas aŭdi ilin mem. Nur unu libro estis antaŭ ne-longe eldonita por finfine doni la parolon al la koncernatoj: *Les filles voilées parlent* (La fraŭlinoj vualitaj parolas), www.lmsi.net/spip.php?article732.

Roland PLATTEAU
Francio

La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Gigantismo (1)

La artikolo *Gigantismo* de Stefan Maul (MONATO 2008/6, p. 7) estas ne nur interesa, sed ankaŭ signifoplena kaj pensiga. Jes, nuntempe kun la rapida disvolviĝo de novaj teknikoj kaj sciencoj kelkaj potenculoj volas fari tion, kion klarvidaj fakuloj kontraŭas. Kelkajn ekzemplojn Maul bone prezentis jam. Tamen se gigantoj estas sekuraj, ili helpas al homoj pli multe kaj bone. Nur antaŭ kelkaj tagoj en Ĉinio bone ekfunkciis trans-mara pontego kun longo de 36 kilometroj. Ĝi certe alportos al la tieaj homoj grandan helpon kaj ankaŭ komencas ludi grandan rolon en la disvolviĝo de tiea ekonomio. Komprenoble sian sukceson ĝi ŝuldas al la kelkjara projektado de multaj altnivelaj sciencistoj. Do mia opinio estas, ke sekureco estas la unua postulo, ĉu ĝi estas granda aŭ malgranda.

Jinming Xu
Ĉinio

Gigantismo (2)

Mi ne nur opinias, ke homoj revenu al homa modesteco kaj planu nur projektojn realigeblajn per ordinaraĵoj rimedoj. Mi rekomendas havi ekonomion sen neceso vojaĝi relative longajn distancojn ĉiutage, ĉiusemajne, ĉiumonate, ĉiujare ... – do: ofte. Laborloko ne estu tro fora de loĝloko. Grandaj magazenoj estu anstataŭataj de etaj butikoj proksimaj al loĝ-labor-lokoj, ripozo estu ebla en proksimo, ne nur en foraj landoj. Ne estu modo vojaĝi kiel eble plej malproksimen por nur kelkaj tagoj – por montri la ekonomian povon kaj havi bonan reputacion. Tio validas en la mikrokosmo de ĉiutaga vivo kun individuaj trafikrimedoj al kaj de loĝejoj, laborejoj, bazaroj ktp, same kiel por longdistancaj pompaj vojaĝoj nur prestiĝecaj aŭ laŭkapricaj ...

Se la furzado de bovoj povas kaŭzi truojn en la monda ozon-ŝirmilo, kion

do povas kaŭzi miliardo da ĉiutage vojaĝantaj homoj ...?

Jomo IPFELKOFER
Germanio

Ĉu bojkoto? (10)

Mi opinias, ke estas necese bojkoti la Olimpiajn Ludojn! Ĉinio mienas, kvazaŭ nenio okazas, kvazaŭ ĉio estas en ordo ... tial estas necese, ke la tuta mondo klare diru al Ĉinio: „Sat! Ne plu!“

František HORÁČEK
Ĉeĥio

Ĉu bojkoto? (11)

Mi esperas, ke okazos la Olimpiadaj Ludoj en Pekino, komenciĝontaj la 8an de la 8a monato 2008 je la 8a horo kaj 8 minutoj kaj 8 sekundoj. La ĉinoj ja kredas, ke 8 estas bonŝanca numero. Pluraj konfuzas Tibeton kaj Nepalon. Tibeto situas norde de Nepalo. En Nepalo gajnis la ribelo kaj estas nun registaro post dek du jaroj da batalo. Nepalo estos respubliko. Multaj kontraŭas la malmultan liberecon en Tibeto kaj en Ĉinio. La registaro de Ĉinio sentas honton, kiam oni protestas kontraŭ ĝi. Sed estas bedaŭrinda afero, se oni miksas politikon kaj sporton. Multaj ne ŝatas la mikسادon. Ni ne haltigu la Olimpikojn 2008 en 2008! Ni ne haltigu sporton!

Navin LAL SHRESTHA
Nepalo

Kiuj sendependiĝu? (10)

Gratulon pro la lastatempaj leteroj en MONATO pri Kosovo sub la titolo *Kiuj sendependiĝu?*. Tro ofte en Esperantujo oni evitas gravajn, tamen tiklajn demandojn, kaŝante sin malantaŭ la bantukon de „neŭtraleco“. Jes ja ni restu neŭtralaj pri partiaj kaj doktrinaj demandoj, sed pri pli vastaj temoj, kiel homaj rajtoj, justeco, lingva diskriminacio, nepre ne. Tio des pli validas por MONATO, kie oni strebas pritrakti ne konferencojn kaj primovadajn aferojn, sed la „realan mondon“, kie ne mankas maljusto, diskriminacio ktp. Esplorante tiun teronon, vi preskaŭ certe iam ofendos iujn, sed ies ofendo estas alies defendo, ĉu ne? Dankon.

David KELSO
Britio/Italio

Fratego fiaskas

de Stefan MAUL

Germana superbazara kompanio *LIDL*, kiu aktivas en pluraj eŭropaj landoj, devis konfesi, ke ĝi elspionas siajn dungitojn. En 500 (!) filioj sole en Germanio ĝi instalas gvatkameraojn tiucele. Oficiale *LIDL* faris tion por malkovri ŝtelojn, sed la detektivoj, kiuj faris tion, elspionis ankaŭ privatajn aferojn de la dungitoj, ties kondukon kaj rilatojn kun kolegoj.

Cetere ne nur *LIDL*, sed ankaŭ aliaj superbazaraj ĉenoj elspionis dungitojn, sed *LIDL* faris tion ekstreme. Ĝi proponas varojn kun grandaj rabatoj, pro kio oni nomas tiajn superbazarojn ankaŭ „diskontistoj”. Kial diskontistoj povas proponi varojn tiel malmultkoste? Inter alie ĉar ili pagas mizerajn salajrojn al laŭeble malmultaj dungitoj, kiuj devas laboregi. Kasistino rakontis al ni, ke oni eĉ konstante kontrolas, kiom rapide ŝi skanas la varojn ĉe la aŭtomata kaso. Kiu estas tro malrapida, riskas maldungon. Ĉu mirigus, se tento al ŝtelado ĉe tiuj mizeruloj estus granda?

Elspioni ĉiujn?

Kiam konatiĝis la skandalo, germanaj politikistoj per drastaj vortoj kondamnis la praktikadon de *LIDL* kaj aliaj diskontistoj. La superbazaroj devis haltigi elspionadon (ĉu ili vere faris, neniu povas scii). Sed samtempe germanaj politikistoj mem preparis leĝprojekton por elspioni civitanojn, eĉ ĵurnalistojn, advokatojn kaj pastrojn! Kiel kutime ĉe tiaj planoj ili argumentis, ke nur tiel oni povas efike batali kontraŭ teroristoj kaj organizata krimado. Provizore juĝistoj haltigis la projekton, sed ni povas atendi, ke la registaro denove provos realigi ĝin.

Ni revenu al la nuna gvatado. En



JAMIE HILDREY

multaj landoj en publikaj ejoj kiel placoj, metrohaltejoj, flughavenoj, benzinstacioj kaj similaj abundas kameraoj. Mia banko afable aŝiŝas ĉe la elpagaŭtomato, ke „pro via sekureco” oni filmas min. Certe ni estas multfoje registrataj ĉiutage per vidbendoj. Ĉu do jam la terura vizio de George Orwell [ĝoĝ oŭel] pri „granda frato”, kiu gvatadas ĉiujn kaj ĉion, iĝis realaĵo? La lando de la aŭtoro de „1984” mem, Britio, eble estas jam la ŝtato de ties fratego. Laŭ statistiko de 2003 jam tiujare en Britio staris 4,2 gvataparatoj, do unu kamerao por 14 loĝantoj. Ĉiu civitano estas registrata meznombro 300 fojojn tage!

Kiel ekspluati?

Nun la estro de la gvatsekcio de la brita polico, Mike Neville [majk nevil], konfesis, ke la ampleksa sistemo instalita dum la pasinta jardeko estas kompleta fiasko. Nur por tri elcentoj de ŝteloj surstrate en Londono oni povis elspuri la dilektulojn helpe de vidbendoj. „Miliardojn da pundoj oni investis en la teknikon, sed neniu pripensis, kiel la polico ekspluatu la filmojn kaj kiel ili estu prezentataj antaŭ tribunalo. Tio estas vera fiasko”, diris Neville. Multajn policanojn fortimigas kontrolado de filmoj el gvataparatoj, „ĉar estas multa laboro”, klarigis la ĉefgvatisto. Ankaŭ por preventado la kameraoj ne taŭgas laŭ lia klarigo, ĉar krimuloj (prave) supozas, ke multaj kameraoj tute ne funkcias.

Ankaŭ policanoj en aliaj landoj plendas, ke estas temporaba laboro ekspluati gvatofilmojn. Ĉu vi povas imagi, kiom tede estas sidi dum horoj antaŭ ekranoj por spekti stultajn bildojn el publikaj ejoj, nur por jen kaj jen trovi eventuale iun scenon, kiu ŝajnas ne kongrui kun leĝo? Por esplori milojn da horoj da registraĵoj oni bezonus tutan armeon da policanoj – kiom da salajroj tio kostus? Ĉiu prudenta homo komprenas, ke pro tio la sistemo de nuntempa „granda frato” devas fiaski. Konsekvence oni devus malmunti ĉiujn kameraojn kaj tiel ŝparus gigantajn sumojn. Ĉu vi memoras, ke antaŭ kelkaj jardekoj en urboj konstante patroladis policanoj piede tra la stratoj, sen kameraoj, sed kun atentemaj okuloj kaj oreloj? Tio vere fortimigis krimulojn, kaj kiam okazis krimo, policanoj tuj povis persekuti fiulojn. Sed tio ja estus tro simpla solvo en epoko, kiam politikistoj pli fidis al tekniko ol homoj.

Falsa sekureco

Estas konsole por homoj kiaj mi, kiuj ĉiam kritikis troan elspionadon de senkulpaj civitanoj fare de ŝtataj instancoj, precipe polico kaj sekretaj servoj. Se nun eĉ la ĉefgvatisto brita mem konfesas, ke tia elspionado estas kompleta fiasko, tio pli ol pravigas tian kritikon – ĝi senmaskigas politikistojn, kiuj asertas, ke ili nur strebas al sekureco por ni, kiel trompulojn. La sekureco promesita de ili evidente estas falsa! ■

BRITIO

Nigraj tagoj por Brown



Tre rapide britoj seniluziiĝis. Anstataŭ en aŭtuno deklari nacian baloton, kiu plej verŝajne estus konfirminta lin kiel elektitan ĉefministron, Brown hezitis.

Post malpli ol unu jaro kiel brita ĉefministro, Gordon Brown [godan braŭn] frontas al la plej grava krizo de sia kariero. Regionaj elektoj komence de majo en Anglio kaj Kimrio klare indikis la malpopularecon kaj de Brown kaj de la nacie reganta Laborista Partio, kiu rikoltis nur 24 % de la voĉoj – malpli ol la tradicia tria partio, la Liberal-Demokrata, kiu gajnis 25 %. Klare venkis, tamen, la ĉefopozicia Konservativa Partio, per 44 % de la voĉoj.

Kiam Brown pasintomere enoficiĝis (senelekto, sed tute leĝe, laŭvole de la reganta partio), britoj – ankaŭ membroj de la Laborista Partio – lin bonvenigis. Ili ne plu fidis la antaŭan ĉefministron, Tony Blair [teŭni blea], kiu montriĝis

supraĵa, nesincera kaj, rilate la Irak-militon, mensogema. Kontraste, Brown, fidela kaj sukcesa ministro pri financoj dum la tuta ĉefministreco de Blair, prezentiĝis, se iom moroza, tamen solide kompetenta.

Reputacio

Tre rapide britoj seniluziiĝis. Anstataŭ en aŭtuno deklari nacian baloton, kiu plej verŝajne estus konfirminta lin kiel elektitan ĉefministron, Brown hezitis. Tuj perdiĝis reputacio pri decidemo. Cetere, kiam oni demandis lin pri lia koncepto pri la estonteco de Britio, denove li ŝanceliĝis, dirante, ke li bezonos tempon por ĝin ellabori. Evidenta stultaĵo el la buŝo de dum 10 jaroj

la dua plej potenca politikisto en la lando; homo, cetere, kiu neniam malkaŝis, ke li ambiciis fariĝi posteulo de Blair.

Dum la vintro ekamasiĝis aliaj problemoj, ĉefe financaj. Kolapsis banko; ŝrumpis kredito; altiĝis prezoj. Ne pri ĉio plene respondecis la registaro, sed la kompetento de Brown sublupeiĝis. Subite eĉ membroj de la Laborista Partio, kiuj dum la somero aklamis Brown savonto de la partio, flustris – publike, en la gazetaro – ke bezonatas nova partiestro kaj ĉefministro. Mankas, tamen, en partio elĉerpita post pli ol 10 jaroj da povo, taŭgaj kandidatoj.

Jubilas

Dume jubilas la konservativuloj, aparte en Londono, kie ilia kandidato – elita, samtempe iom burleska ulo – venkis bone konatan kaj iniciateman laboristan rivalon por fariĝi urbestro. Finfine, diras britoj, la konservativuloj, post deko da senfokusaj, sencelaj opoziciaj jaroj, komencas impresi kiel onta registara partio.

Tio verŝajne ne okazos ĝis post du jaroj. Nenio devigas Brown anonci nacian baloton ĝis la jaro 2010. Multo, ĉu enlande, ĉu eksterlande, povus intertempe ŝanĝiĝi. Restas tempo por koncentriĝi kaj solvi aktualajn problemojn – kaj vortumi koncepton pri moderna Britio. Cetere Brown konsolos sin, ke rezultoj de regionaj elektoj ne nepre prognozas la rezulton de nacia baloto.

Aliflanke, kiam Brown konsideras, ke la distrikto en Skotlando, kie li loĝas, elektis liberal-demokratitan deputiton; ke la skota parlamento estas regata de la Skota Nacia Partio; kaj kiam li laboras en Londono, la urbestro estas konservativulo, eblas imagi, ke li foje cerbumas pri sia politika estonteco.

Paul GUBBINS

Nova ĉefo, nova aŭroro



An T'aoiseach, Brian
COWEN

En la irlanda graflando Offaly, gaele Uíbh Fhailí [iv fa li], hejmo de Brian Cowen, la nova ĉefministro de la Irlanda Respubliko, aĉetebblas to-ĉemizoj kun porteto de Cowen desegnita kiel imitaĵo de la konata bildo pri Che Guevara farita de irlanda artisto Jim Fitzpatrick [ĝim ficpatrik].

Ekde majo 2008 la Irlanda Respubliko havas novan ĉefministron, aŭ *taoiseach* [tiŝah], nome Brian Cowen [brajan koen]. Cowen, profesia advokato, kiu naskiĝis en 1960, jam okupis gravajn ministrajn oficojn en sinsekvaj registaroj, en kiu regis la respublikana partio Fianna Fáil (FF). Li estas rigardata, eĉ de rivaloj, kiel kompetenta kaj energia politikisto, kiu aparte sukcesis kiel ministro pri financoj.

La nuna registaro de la respubliko konsistas el FF (la majoritata partio), la Verda Partio (ekologia), kaj la malgranda Progresiva Demokrata Partio (PD). Antaŭ sia elekto kiel ĉefministro, Cowen surprizis la nacion per prelego, en kiu li fortege esprimis sian intencon apogi la irlandan (gaelan) lingvon.

Patro de la ŝtato

Laŭ la konstitucio de la Irlanda Respubliko, la unua oficiala lingvo estas la irlanda. La angla estas dua oficiala lingvo. Post la morto de Eamon [ejmon] de Valera, la „patro” de la moderna irlanda ŝtato, kaj ĉefa aŭtoro de la konstitucio, preskaŭ neniu posta registaro faris seriozajn klopodojn por firmigi la statuson de la nacia lingvo kaj igi ĝin efektiva unua idiomo de la lando. En unu el la antaŭaj FF-registaroj, ministrino pri irlandlingvaj aferoj montris nenium intereson pri la lingvo kaj eĉ konfesis, ke ŝi ne parolas ĝin.

Laŭŝajne Cowen intencas ŝanĝi tiun situacion. Kiam li anoncis sian novan kabineton, li unue nomis la novajn ministrojn per la gaelaj formoj de iliaj nomoj. La plimulto de la ministroj meze aĝas proksimume 40 jarojn, kaj ĉiuj flue parolas la irlandan lingvon. Verŝajne tio neniam okazis en la irlanda parlamento. Cowen mem majstras la lingvon, sed ne nur la FF-ministroj estas gaelparolantoj. Ankaŭ la verduloj fervore apogas la lingvon kaj uzas ĝin je ĉiu eblo.

Ĉu nova aŭroro por la irlanda?

Garvan MAKAJ

ISRAELO

La juda ŝtato – 60-jara

La juda ŝtato Israelo estas unu el la plej ofte menciitaj lokoj en internaciaj gazetaraj, televidaj kaj aliaj mondaj amaskomunikiloj. Se surteriĝus gasto el Marso, tiu emus kredi, ke temas pri granda potenco, simile al Usono, Rusio aŭ Germanio.

La amaskomunikiloj ŝatas la konflikton inter Israelo kaj palestinanoj. En diversaj partoj de la mondo okazas ĉiutage sangaj incidentoj, teruraj kaj tragikaj, sed, ĉar tie apenaŭ ĉeestas raportistoj kaj kameraistoj, oni malmulte legas kaj spektas ilin. Tamen, se en Israelo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo okazas eĉ eta incidento, ĝi tuj aperas en la amaskomunikiloj. Rezulte, ordinara novaĵkonsumanto ricevas la impreson, ke en Israelo okazas ĉiutage militado kaj senĉesaj sangaĵoj.

Kompreneble multas sekurecaj problemoj en Israelo kaj la regiono. Sed Israelo havas aliajn interesajn kaj eĉ unikajn aspektojn, malpli konatajn. Ĝuste ilin mi iomete bildigos okaze de la 60-jariĝo de tiu ĉi ŝtato.

Defendarmeo

Israelo fondiĝis en majo 1948, sekve de decido de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Okazis tiam milito inter la defendarmeo de la ĵus fondita juda ŝtato kaj la atakantaj militfortoj de la palestina loĝantaro, helpataj de la armeoj de najbaraj arabaj ŝtatoj.

Mi ne deziras priskribi la rezultojn de tiu ĉi milito, kiu igis kelkajn centmilojn da palestinanoj forlasi siajn loĝlokojn kaj fariĝi rifuĝintoj. Mi volas rakonti pri aliaj evoluoj, grandparte bonaj kaj parte malbonaj, okazintaj en Israelo dum la pasintaj 60 jaroj krom (kaj malgraŭ) militado kontraŭ arabaj ŝtatoj kaj terorismaj organizaĵoj.

Unu el la plej grandaj sukcesoj de Israelo estis la enmigrado de tri milionoj da judoj el ĉiuj mondpartoj. Jam en la

unuaj jaroj de ĝia ekzisto Israelo akceptis kvanton de alvenintoj, kiu superis la nombron de la loka loĝantaro. Enmigrado tia unikas en la mondo. Rezulte nun vivas en Israelo preskaŭ duono de la tutmonda juda popolo.

Novenmigrintoj

En 1948 vivis tie nur 650 000 judoj, nur eta parto de la tiama 11-miliona tutmonda judaro. Nun vivas tie ĉirkaŭ sep milionoj da loĝantoj, el kiuj 76 % estas judoj (ceteraj israelanoj estas islamaj kaj kristanaj araboj kaj rusdevenaj kristanoj). Malgraŭ malfacilaĵoj, la judaj novenmigrintoj plene sorbiĝis en israelajn socion kaj ekonomion kaj iliaj infanoj jam regas nature la hebrean lingvon.

Dume ekonomie evoluis Israelo. Antaŭ 60 jaroj tiu ĉi juna ŝtato, naskiĝinta dum milito, troviĝis en mizera ekonomia stato. Tamen ŝanĝiĝis la situacio precipe danke al du faktoroj: 1. monhelpo ricevita – donace kaj prunte – de la tutmonda judaro; subvencioj kaj pruntoj de usonaj registaroj; kaj holokaŭsto-kompensa

mono el Germanio; kaj 2. la talento kaj kreivo de israelaj civitanoj, kiuj estigis altnivelajn agrikulturon kaj industriojn, inkluzive teĥnologiajn.

En 2007 la jara kresko de la israela ekonomio estis pli ol 5 %. En tiu ĉi jaro la vivnivelo de meza israelano atingis 25 000 dolarojn kompare kun 3 100 en 1948. Malmultaj ŝtatoj tiom kreskis. Memorindas, cetere, ke dum ĝiaj 60 jaroj Israelo trairis plurajn militojn kaj devis daŭre dediĉi grandan parton de sia buĝeto al defendado.

Ekspansio

Intertempe la ekonomio evoluis de malnova, fermita socialisma sistemo, plene regata de la registaro, al malfermita konkurenco-hava kapitalismo, kiu ebligis, ke ĝi adaptiĝu al tutmondismo. Ekonomia ekspansio tamen kunportis negativajn aspektojn. En la 1950aj jaroj Israelo estis unu el la ŝtatoj, kies civitanoj statistike estas ekonomie plej egalnivelaj. En la nuna jarcento ĝi estas la plej mal-egala inter ĉiuj okcidentaj ekonomioj.



Tiu ĉi fakto timigas. Ne pri socio tia revis siatempe la fondintoj de la juda ŝtato kaj la cionistaj pioniroj, kiuj fondis la egalecajn kooperativajn vilaĝojn – la „kibucojn”.

Alia makulo estas korupto fontanta el ligoj inter mono kaj povo (alidifine: kapitalo kaj reĝimo). Verdire ne tiom temas pri ŝtatoficistoj, kiuj akceptas subaĉetan monon, kiel laŭdire en la t.n. tria mondo kaj ekssocialismaj ŝtatoj. Temas pli pri ministro aŭ alia ŝtata aŭ municipa servanto, kiu kariere favoras sampartianon aŭ amikon. Konduto tia pli oftas en Israelo ol en okcidenta Eŭropo kaj danĝerigas la stabilecon de la socio kaj la reĝimo.

Burokratismo

Restaĵo de antaŭaj jaroj, kiam evoluis nova socio, estas burokratismo. En multaj registaraj instancoj restas burokratisma mallerteco: verdire la publika sektoro (ministerioj, municipaj instancoj kaj aliaj ŝtataj organizaĵoj) estas ŝvela, havanta tro da dungitoj. Fakuloj kalkulas, ke en Israelo la relativa nombro de ŝtataj oficistoj pli altas ol en aliaj okcidentaj landoj.

Priferinda estas la progreso en universitatoj kaj sciencaj esploroj. La israela ŝtato kaj la eksterisraela juda popolo multon investis por fondi kaj plifortigi universitatojn kaj institutojn pri scienca kaj teĥnologia esploro. Nun ekzistas sep universitatoj, kies nivelo egalas al tiu de la plej bonaj universitatoj de Usono kaj Eŭropo. Israelaj esploristoj troviĝas inter la plej aktivaj kontribuantoj al sciencaj publikaĵoj. Kvar israelanoj ricevis dum la lastaj 10 jaroj Nobel-premiojn pri ĥemio kaj ekonomiko.

Patentoj

Krom universitatoj ekzistas multaj superaj lernejoj. Ankaŭ esplor-institutoj kaj „kompanioj por apliko” funkcias apud la universitatoj kaj enspezigas al ili multe da profitoj. Tiu ĉi modelo estis kreita en Israelo kaj estis poste adaptita en aliaj landoj. Ekzemple, apud la scienca instituto Weizmann, kun pli ol 1500 familioj da patentoj, funkcias

kompanio, kiu enkomercigas profitocele la inventaĵojn de la sciencistoj. Danke al bonaj „cerboj” tiaj, Israelo atingis la unuan lokon en la mondo rilate investon en esplorado kaj evoluigo rilate al Malneta Enlanda Produkto (MEP).

En la lastaj jaroj tamen la situacio ŝanĝiĝis. La registaro malpli investas, neglektante kaj riskante pluan evoluon de la universitatoj. Aŭdiĝas avertoj, ke Israelo ne plu tiurilate evoluos sed mal-evoluos. Jam elmigras israelaj sciencistoj kaj universitatoj al Usono kaj aliaj okcidentaj landoj. Nuntempe la nombro de israelanoj, kiuj laboras en usonaj universitatoj, egalas al 25 % de la nombro de stabanoj en israelaj universitatoj. Tio danĝerigas la intelektan superecon akiritan de la israela ŝtato dum la lastaj jardekoj. Se oni aldonas la malaltiĝon de la nivelo de la baza israela eduka sistemo (pro malaltaj instruistaj salajroj), la estonteco ne rozkoloras.

Medicino

Israelaj medicino kaj sansistemo multon atingis. Loka medicino troviĝas inter la plej bonaj en la okcidenta mondo. Viroj vivas averaĝe 79 jarojn, virinoj 83: unu el la plej bonaj statistikoj en la mondo. Same ĉe novnaskitoj: mortas nur kvar novnaskitoj el 1000. La nivelo de israelaj kuracistoj (inter ili relative multaj araboj) altas kaj uzo de modernaj teĥnologioj unuarangas.

Aliflanke malsukcesis transportado. Dum en preskaŭ ĉiu evoluinta lando ekzistas jam delonge efikaj trajnoj, metrooj kaj aliaj publik-transportiloj, en Israelo rimedojn tiajn oni neglektas. La registaro diras, ke mankas mono. Nur en la lastaj 10 jaroj oni komencis pligrandigi la fervojon. Ankoraŭ mankas metroo, tiel ke ekzemple en Tel-Avivon, la ĉefan metropolon de Israelo, eniras ĉiutage ĉirkaŭ duonmiliono da veturiloj. La solaj publikaj transportiloj estas aŭtobusoj kaj taksioj.

Infanoj

Okaze de Universalaj Kongresoj de Esperanto mi vizitis Italion kaj Japanion. Mi eksciis, ke en ambaŭ landoj la

nasko-elcentaĵo malaltas. Junaj paroj, ŝajne, ne volas infanojn. En Israelo regas alia sinteno: ĉiu virino naskas averaĝe tri infanojn, kio certigas, ke kreskos la loĝantaro.

Jen aliaj interesaj faktoj:

Rilate grandecon de la loĝantaro Israelo troviĝas en la dua loko en la mondo laŭ libroj eldonataj kaj en la unua loko laŭ personaj komputiloj.

Israelo estas la sola ŝtato en la mondo, kiu eniris la 21an jarcenton kun pli da laboroj ol komence de la 20a jarcento.

Multaj t.n. triamondaj ŝtatoj estas helpataj de Israelo pri agrikultura progresigo kiel akvumado, plibonigo de tero kaj rikoltoj.

Israelaj bovinoj liveras la plej grandan kvanton da lakto en la mondo, rezulte de diversaj teĥnologiaj inventaĵoj.

Jam de kelkaj jaroj israelanoj troviĝas inter la tri unuaj lokoj en la mondo laŭ relativa nombro de patentoj.

En Israelo oni sukcesis eltrovi metodojn por kulturi legomojn en la dezerto, akvumante ilin per modifita sala akvo.

Israelo estas unu el nur tri aziaj ŝtatoj (la aliaj estas Japanio kaj Koreio), kiuj aperas en la kongresa kotiztabelo de UEA sub kategorio A, kio signifas, ke ĝi estas konsiderata riĉa lando (miaopinie malĝusta difino, ĉar efektive multaj israelaj samideanoj ne povas permesi al si veturi al UK pro manko de mono).

Mirakloj

Do multaj atingiĝoj, iusence eĉ mirakloj, okazis en la relative nova juda ŝtato ekde ĝia fondiĝo antaŭ 60 jaroj. Kreiĝis samtempe multaj problemoj, eĉ sen la plej granda: la senĉesa vivdanĝero pro minacoj de malamikoj, kiuj ankoraŭ ne akceptas la ekzistorajton de tiu ĉi ŝtato. Kiel dirite, ĉi tiun tiklan temon mi preskaŭ ne tuŝis, malgraŭ tio, ke ĝi enormas.

Lasta frazo: se malgraŭ la supre menciitaj vivdanĝeroj okazis en Israelo dum ses jardekoj tiom da progreso kun tiom da sukcesoj, oni povas nur imagi, kiom atingus la juda ŝtato, se regus en la regiono paco kaj harmonio.

Josef ŠEMER

FUTBALO

Punŝoto



UEFA
EURO2008
Austria-Switzerland



Fine de marto la Monda Federacio de Futbalo portempe suspendis la albanan nacian futbalteamon, tiel ke ĝi ne povos partopreni internaciajn eventojn en- aŭ eksterlandajn.

La suspendon kaŭzis esploroj rilate korupton flanke de Armado Duka, gvidanto de la sendependa enlanda sporta federacio de futbalo. La Monda Federacio de Futbalo subtenas la enlandan federacion ĝis proksimume 80 % de ties buĝeto. Akuzoj kontraŭ Duka ankoraŭ ne estas pruvitaj, sed intertempe albanoj rezignu pri internacia futbalo.

Bardhyl SELIMI

SOCIO

Saluton!



„Diru ‘Saluton!’ al via kolego, najbaro aŭ hazarda preterpasanto.” Jen la mesaĝo, kiun membroj de *Mesaĝo sen nomo* amase transdonis en Belgio inter la 5a kaj 10a de majo. „Antaŭ multaj jaroj oni estis preskaŭ devigita saluti ĉiun, precipe en vilaĝo,” diras Piet Jaspert [pit jaspert] el *Mesaĝo sen nomo*, „sed nun tiu kutimo preskaŭ komplete velkis. En urbego kiel Antverpeno oni tute ne povas saluti ĉiun, kiun oni renkontas, sed provu fari tion en restoracio, en butikoj aŭ en aŭtobuso. Ne ĉiu reagas entuziasme, sed plej ofte jes. Amikeco spronas amikecon.”

La „Semajno de la salu-

tado” estis iniciatita antaŭ kelkaj jaroj de iuj firmaoj, ĵurnaloj kaj reklamkompanioj. Per tiu kampanjo ili volas haltigi „la acidigon de nia socio”. Diru „Saluton!” tamen ne nur spronas amikecon, sed povas ankaŭ plenumi monujon. Dum la semajno pluraj dekoj da anonimaj kontrolantoj promenis tra la urboj, serĉante salutantojn. Ĉiu, kiu spontanee salutis ilin, ricevis tuj 25 eŭrojn. Kaj inter ĉiuj tiuj premiitoj denove du estis elektitaj – unu flandro kaj unu valono – kaj ricevis 25 000 eŭrojn.

Saluton!

Paŭl PEERAERTS

Feliĉan datrevenon!

Ĉi-jare Bruselo festas la 50an naskiĝdatrevenon de sia plej granda fiereco-simbolo, Atomiumo. Tiu ĉi impona monumento estas konstruita por la Internacia Ekspozicio de 1958, simile al la Eiffel-turo en 1889. Laŭ la planoj Atomiumo restus dum nur ses monatoj. Tamen preskaŭ 50 jarojn poste ĝi plu ekzistas: la monumento fariĝis tiel populara, ke oni decidis lasi ĝin.

La preskaŭ mirakla konstruaĵo, 102 metrojn alta, konsistanta el naŭ sferoj kun diametro de 18 metroj, prezentas la atomojn en ferkristalo. La arkitekto estis André Waterkeyn, flandra inĝeniero (1917-2005), kiu fariĝis en 1954 ekonomia direktoro de la federacio de la flandra metalindustrio, Fabrimetal.

Restoracio

Verdire la originala plano de la organizantoj de la Internacia Ekspozicio estis konstrui renversitan Eiffel-turon,

sed tiu ideo ne plaĉis al Waterkeyn. Fine de la 1990aj jaroj li helpis organizi la rekonstruon de la monumento, sed mortis iom antaŭ la fino de la laboroj. Okaze de lia morto ricevis lian nomon la supra sfero, en kiu troviĝas restoracio. Atomiumo estas la sola konata verko lia. Post la ekspozicio en 1958 li fariĝis prezidanto de la asocio, kiu mastrumas Atomiumon.

Antaŭ la renovigo la monumento ricevis jare ĉ. 300 000 turistojn. Poste, okaze de la datreveno, venis 700 000, aŭ tage preskaŭ 2000.

Korodrezista

Strange estas, ke, kvankam Atomiumo devis simboli la progreson faritan en Belgio rilate la ŝtalindustrion, la sferoj mem estas konstruitaj el aluminio. Verŝajne dum la konstruo oni transiris al la tiam relative nova metalo aluminio, ĉar ĝi pli bone rezistas korodon. Tamen dum la rekonstruo oni forprenis



WWW.WIKIPEDIA.ORG

la aluminiajn platojn kaj anstataŭigis ilin per korodrezista ŝtalo. La aluminiaj platoj estis forvenditaj por kunfinanci la rekonstruon, kiu kostis 23 milionojn da eŭroj.

La eventoj de la jubilea jaro komenciĝis la 17an de aprilo 2008 kaj daŭros ĝis la 19a de oktobro: la datoj spegulas precize la daŭron de la ekspozicio antaŭ 50 jaroj. Inaŭguris la festperiodon koncertoj kaj piroteknikaĵoj. Viziteblas ekspozicio pri tiu de 1958, kiu inkluzivas fotojn kaj filmojn pri la konstruado de Atomiumo.

Por la festo organizantoj konstruigis grandan pavilonon antaŭ Atomiumo el 33 000 malplenaj bierkestoj, ĉar Belgio famas pro sia biero. Tiel eblas reuzi la materialon. Oni baptis ĝin „pavilono de la portempa feliĉo”, kaj en ĝi okazas filmprezentoj kaj ekspozicioj pri pasintaj Internaciaj Ekspozicioj.

Lode VAN DE VELDE

AUTORO-RAJTOJ

Fotilo-kaptilo

La leganto de la artikolo pri Atomiumo eble demandas sin, kial **MONATO** ne aperigas bildon pri ĝi. Simple, ĉiu uzo de bildo pri Atomiumo devas esti raportita al la organizaĵo *Atomium* aŭ al SABAM, la belga organizaĵo, kiu defendas aŭtoro-rajtojn. Kialo: la kopirajto de la bildo apartenas al la familio de la arkitekto, André Waterkeyn.

Tio signifas, ke la aŭtoro de la artikolo faris fotojn, sed ne uzas ilin. Se tamen iu uzas la fotojn, la fotisto pagu punon de 91,54 eŭroj. Tiamaniere la posteuloj de Waterkeyn, kiu mortis

en 2005, enspezos jare ĝis 2075 – laŭ raporto en la flandra gazetaro – 30 000 eŭrojn. Tiel ili „riĉiĝas dormante”.

Ĉu tio ekscese ekspluatas aŭtoro-rajtojn? La posteuloj neniel alportas kreaĵojn plusvaloron al la artprodukto. Tamen tio validas ankaŭ por klasika muziko aŭ pentraĵoj. Kio do realistas, kio ne?

Blogo

La afero signifas, ke, ekzemple, se juna enamiĝinta paro pozas kun la monumento en la fono de la bildo kaj poste aperigas la foton en blogo, pagendos monpuno. Tio klare ekscesas. Des pli, se

oni konsideras, ke ekzistas homoj salajrataj por elserĉi (mis)uzojn tiajn de bildoj pri Atomiumo. Male poŝtkartovendisto, kiu vendas fotojn pri Atomiumo, tutklare komerce misuzas la bildon.

La mastruma asocio de Atomiumo atentigas, ke ĝi ne povas ŝanĝi la situacion. Ĝi klarigas, ke amatoraj bildoj ne estos punitaj. Cetere la asocio de aŭtoro-rajtoj, SABAM, precizigas, ke oni ne pagu por anonci ekspoziciojn aŭ aliajn eventojn ĉirkaŭ la monumento.

Ĉe www.anno-expo.eu aperas kelkaj fotoj. Ankaŭ ironia, nigra-blanka bildo el 1958 kun granda kolora florbrasiko kaŝanta Atomiumon cirkulas en la reto.

Lode VAN DE VELDE

ALBANIO

Silentas voĉo popola

Fine de majo informis amaskomunikiloj pri la morto de la ĉefo de probable la plej spektata privata televido-kanalo en Albanio. Dritan Hoxha [hoĝa], 40-jaraĝa, estro de la kanalo „Top Channel” kaj fondinto interalie de kafo-kompanio, mortis pro aŭto-akcidento, kiam li tro rapide stiris sian „Ferrari”. Akompanis lin 27-jaraĝa belulino.

Pro liaj diversaj kompanioj – televidaj, radiaj, tagĵurnalaj – oni nomis lin „la albana CNN”. Tamen notindas, ke liaj amaskomunikiloj fariĝis iasence la voĉo de ordinaraj albanoj. Li kritikis kaj denunciis ĉion eraran, koruptan kaj neleĝan de la regantaj partioj, ĉu socialistaj, ĉu demokratiaj.

Post lia morto omaĝis lin ne nur la popolo sed ankaŭ politikistoj, inkluzive de la ŝtata prezidanto Bamir Topi.

Bardhyl SELIMI



LOĜADO

Premas prezoj

De jaro al jaro pliboniĝas la ekonomia situacio en Ukrainio. Kreskas salajroj, sed samtempe prezoj de manĝaĵoj, vestaĵoj kaj loĝejoj. Nuntempe tiuj, kiuj deziras apartan loĝejon, aŭ almenaŭ iom plibonigi siajn loĝkondiĉojn, ne povas finance tion permesi.

En februaro 2008 en Kievo, kompare kun decembro 2007, kreskis je 59 % la nombro de loĝejoj vendotaj. Kreskis dum la sama periodo ankaŭ la nombro de aĉetuntoj (de 20 000 ĝis 29 000). Tiel eblas prognozi, ke prezoj de loĝejoj kreskos ĉiumonate je proksimume 1,5 % ĝis 3 %.

Dmitrij CIBULEVSKIJ



BANKOJ

Kreditkrizo daŭras

En septembro 2007 la klientoj de *Northern Rock*, malgranda brita banko, specialisto pri hipotekaj kreditoj, enviciĝis por repostuli siajn mondeponojn. Estis la unua okulfrapa efiko de tutmonda financa krizo, kiu jam de pluraj monatoj minacis kaj havis efikojn multflankajn.



Kvankam pro la okazaĵoj ĉe *Northern Rock* la – precipe usondevena – krizo pli vaste diskoniĝis ĉe la publiko, ĝiaj problemoj havis iom alian originon. La normala proceduro estas, ke banko kolektas la ŝparmonon de siaj klientoj kaj per tiu amasigita kaj relative stabila kapitalbazo donas al aliaj klientoj pli longdaŭrajn pruntojn garantiitajn per hipoteke je la financita nmoveblaĵo. *Northern Rock* tro rapide ekspansiis kaj la mondeponoj de ĝiaj klientoj ne sufiĉis. Tial ĝi laŭbezone pruntis monon ĉe aliaj bankoj, proceduro kvazaŭ aŭtomata kiam la financa merkato estas stabila. Tamen, kiam la brita rentonivelo altiĝis, la banko konfrontiĝis al duobla problemo. Unue, ĝi devis pagi al la aliaj bankoj renton pli altan, ol ĝi ricevis pro

la pruntoj, kaj do perdis; due, pro la pli alta rento la hipoteka merkato iĝis pli riska. El tio rezultis, ke *Northern Rock* perdis la fidon de la aliaj bankoj kaj restis senmona. La klientoj – kiuj ne forgesis, ke la brita registaro en 1991 lasis bankroti *BCCI*, bankon kun parte krima, sed ankaŭ parte tute honesta klientaro – rapidis por repostuli sian ŝparmonon. Finfine, *Northern Rock* estis ŝtatigita kaj tiel savita.

Aĉetstimulado kun katastrofaj sekvoj

Posedi sian propran domon en multaj landoj estas konsiderata la plej efika projekto de la familio. Tiel ankaŭ estas en Usono, sed antaŭ kelkaj jaroj tie ekregis

ia eŭforio en la doma merkato kaj, kredante ke la domprezoj senĉese altiĝos, la bankoj tro facile donadis monpruntojn. Se la pruntoprenanto ne kapablos repagi, la valoro de la domo ja sufiĉos por kompensi la bankon. Al tiu facilanima konduto aldoniĝis agresemaj, eĉ trompaj vendopraktikoj de makleristoj, kiuj enspezis laŭ la nombro de subskribitaj kontraktoj kaj ne atentis la realan situacion kaj pagkapablon de la pruntoprenantoj. Estis ekzemple ofertitaj pruntoj kun tre favora rento kaj do malgranda monata repago dum la komencaj jaroj, aŭ kun rento varianta laŭ la merkataj cirkonstancoj, dum klientoj kredis, ke la rento kaj repago estos fiksjaj dum la tuta pruntoperiodo.

Pro la nesufiĉa kontrolo de la kvalito de la pruntoprenantoj, la risko je nepago jam estis altiĝanta. Dum la lastaj jaroj aldoniĝis pliaj danĝeroj: pruntoprenantoj pro la ekonomia krizo perdis sian laboron kaj devis kontentigi sin per malpli alta salajro aŭ restis senlaboraj; por aliaj la monataj repagoj ege kreskis post la fino de la favora komenca periodo kaj pro la ĝenerala altiĝo de la rentonivelo. Rezulte, ke usonanoj amase malkapablis fari siajn monatajn repagojn kaj estis eligitaj el siaj domoj. Laŭ iu statistiko 1,25 milionoj da personoj inter aŭgusto 2007 kaj aprilo 2008 perdis sian loĝejon. Pro la multaj vendataj domoj la domomerkato kolapsis. Kvankam ekzistas pluraj kontrolinstancoj, kiuj estus devintaj preventi tian katastrofon, neniu el ili efike funkciis. Ankaŭ la usona registaro tro malfrue kaj tro apatie intervenis por limigi la damaĝojn.

Ne nur usonaj, ankaŭ eŭropaj suferoj

Laŭ tradiciaj bankaj principoj tia grandskala disdonado de hipotekaj kre-

ditoj ne estus ebla. La sumo de la hipotekaj pruntoj (kaj kreditoj ĝenerale), kiujn banko rajtas doni, dependas de la sumo de la kapitalo de la banko, do almenaŭ teorie ekzistas iu „bremso”. Tiun limigon la bankoj ĉirkaŭiris vendante, laŭ komplika proceduro, la pruntojn al aliaj financaj institucioj. Tiel la pruntoj malaperas el la bilanco de la banko, liberigās kapitalo por denove doni pruntojn, kiuj denove estas vendataj ktp. La pruntoj finfine alvenas ĉe spekulantoj kaj aliaj bankoj, kiuj tute ne havas rilaton kun la originaj pruntoprenantoj. La risko de nepago estas kovrita interalie de kredita-sekuro, sed evidentiĝas, ke tiu asekuro ne estis tute sekura.

La unua grava viktimo ne estis usona, sed eŭropa: *Industriekreditbank (IKB)*, je 38 % posedaĵo de germana ŝtata bankogrupa *KfW*, donis grandegan krediton al investgrupo, kiu per tio aĉetis usonajn hipotekajn pruntojn. Tiuj pruntoj perdis sian valoron, sekve de tio *IKB* riskis kolapsi kaj *KfW* – malrekte la germana ŝtato – devis interveni por savi ĝin. Dum la postaj monatoj aperis similaj perdoj ĉe aliaj ŝtataj bankoj, sed ankaŭ ĉe privataj kaj aliaj eŭropaj (kaj kompreneble ankaŭ usonaj) bankoj. Ankoraŭ nun kelkfoje monate iu banko anoncas perdegon, parte atribuitan al usonaj hipotekoj. Restas enigmo, kial eŭropaj bankoj amase investis en tio kaj kial restis malefikaj la protektomekanismoj.

Bankoj ne lernas pro siaj eraroj ...

La 24an de januaro 2008 la franca banko *Société Générale* – la tria plej granda banko de Francio kaj naŭa de la mondo – anoncis perdon de 7,1 miliardoj da eŭroj. 4,8 miliardoj estis kaŭzigitaj de malsukcesinta spekulado de unu oficisto de la banko. La afero tre similas al okazaĵo el 1995, kiam oficisto de *Barings* kaŭzis perdon de proksimume unu miliardo da eŭroj (malfacilas akurate kompari la tiamajn valutokurzojn) kaj tiel bankotigis sian bankon (MONATO, 1995/5). Diferenco estas, ke en 1995 temis pri oficisto en fora filio de malgranda banko, laboranta apenaŭ kontrolate,

dum en 2008 la oficisto laboris en pariza ĉefoficejo de bankego. Kiel en 1995 la estroj asertas, ke ili nenion sciis kaj estis trompitaj de oficisto sole aganta. Tamen, estas pluraj indikoj, ke ĉi-foje la estroj klare sciis, kion faras la oficisto, kaj eĉ ricevis avertojn de aliaj bankoj pri riskegaj transakcioj.

La malemo de la bankoj pruntopreni inter si pro tio ankoraŭ pligrandiĝis kaj devigis la centrajn bankojn pli interveni kaj disponigi, eĉ kontraŭvole, monon al endanĝerigitaj bankoj.

ABN AMRO

Lasta granda banka afero – kiu ĝis nun ne vere kaŭzis problemojn, sed pri kiu oni eble parolos dum la venontaj monatoj kaj jaroj – estas la batalo por transpreni la grandan nederlandan bankon *ABN AMRO*. Tiu banko jam delonge serĉis eksterlandan partneron. En marto 2008 la brita *Barclays* faris oferton por transpreni ĝin; tiel ekestus la plej granda eŭropa bankogrupa. Jam estis preparataj la administraj formalajoj por definitivigi la transakcion, kiam unu monaton poste venis oferto de tri aliaj bankoj: la belgandederlanda *Fortis*, la brita *Royal Bank of Scotland* kaj la hispana *Santander*. La tri havis la intencan dispecigi *ABN AMRO* kaj dividi la plej interesajn partojn inter si. *Barclays* plialtigis sian oferton ĝis 67 miliardoj, sed vane. Post longa disputado la triopo akiris *ABN AMRO* je prezo de preskaŭ 71 miliardoj da eŭroj.

La batalo pri *ABN AMRO* ekis komence de 2007, kiam la etoso rilate al fuzioj kaj transprenoj ankoraŭ estis eŭforia kaj kiam abundis mono. Dum 2007 la situacio draste ŝanĝiĝis, sed neniu el la ofertantaj bankoj volis cedi. Kiam en oktobro 2007 la triopo finfine gajnis, precipe *Fortis* nur malfacile trovis la monon por pagi sian parton de la aĉetprezo. Nun okazas la intertraktadoj por decidi, kiu parto de *ABN AMRO* iru al kiu el la partneroj. Dum la venontaj du-tri jaroj tiuj partoj devos esti integritaj en la respektivaj banksistemoj. Fakuloj demandas sin, ĉu la integriĝo facilos kaj ĉu finfine estos iu pozitiva financa rezulto por la akciuloj. Jam estas konataj

la perdantoj: 10 000 ĝis 20 000 oficistoj ne plu estos bezonataj.

Kromaj efikoj

Dum pluraj jaroj la negoco de dubaj hipotekaj kreditoj kaj la provoko de entreprenaj restrukturadoj estas ŝatata okupo de spekulantoj kaj aliaj financistoj. Ĉar tiu merkato iĝis malpli alloga, ili serĉis pliajn agadkampojn, interalie komercadon de manĝaĵoj kaj biokarburadoj. Tio estos temo por alia kontribuado.

Roland ROTSAERT

La diagramo montras la erojn de tipa biliga strukturo. Gravus noti, ke ne ĉiuj biligoj estas samaj; tamen la diagramo montras la kutimajn partoprenantojn en tia strukturo. Jen la ĉefaj:

Emisianto – Speciala ento, protektita kontraŭ bankroto, kreita por faciligi la biligon kaj por disponigi la bilojn al investantoj.


Pruntodonanto – Ento, kiu kontraktas kaj financas pruntojn, kiuj povas esti vendataj al alia ento por biligo. Tiam pruntodonantoj ricevas kontantan monon kaj kurtaĝon. Fojefoje la pruntodonanto havas kontrakton kun makleristo. Pruntodonantoj povas esti bankoj aŭ ne-bankoj.

Hipotekomakleristo – Agas kiel interpersono inter la pruntodonanto kaj la pruntoprenanto. Li ricevas makleraĵon kiam la prunto estas kontraktita.

Servisto – Ento respondeca por kolekti la repagojn de la pruntoprenantoj kaj por transdoni tiujn pagojn al la emisianto, kiu distribuos ilin inter la investantoj. La servisto estas kompensata per kurtaĝo je la volumo de la servitaj pruntoj. Li havas la devon maksimumigi la transpagojn de la pruntoprenantoj al la emisianto. Li okupiĝas pri postrestantaj repagantoj kaj vendo de hipotekitaj nemoveblaĵoj.

Investantoj – Ili aĉetas la diversajn bilojn emisiitajn dum la biliga proceduro.

Hipoteka pruntado laŭ biliga proceduro



[http://en.wikipedia.org/wiki/Image:Borrowing Under a Securitization Structure.gif](http://en.wikipedia.org/wiki/Image:Borrowing_Under_a_Securitization_Structure.gif)

ro. Ili financas la pruntojn kaj diversnivele portas la riskon de la pruntoj, kiujn ili aĉetas.

Taksad-agentejo – Taksas la komencon riskon de la emisiitaj biloj kaj poste adaptas la taksojn surbaze de la repagoj kaj la realaj riskoj. Ĝiaj kriterioj influas

la bazan strukturon de la biligo.

Sindiko – Ekstera ento, kiu prizorgas la interesojn de la investantoj en la biligo. La sindiko garantias, ke la biligo okazas laŭ la biliga interkonsento, ekzemple ke la servisto agas laŭ la interkonsentitaj kriterioj.

Garantia konsorcio – Administras la emisiadon de la biloj al la investantoj.

Kreditsekurigisto – Biligaj transakcioj povas inkluzivi kreditasekuron (por malgrandigi la kreditriskon de strukturo) disponigitan de sendependa ento en formo de kreditletoj aŭ garantioj.

Subkaŝita lingvo

Manchán [manahon] Magan estas juna irlandano, kiu lastatempe prezentis serion da televidprogramoj, en kiu li esploras la hodiaŭnan staton de la irlanda lingvo. Kvankam, laŭ la nacia konstitucio, la irlanda (gaela) estas la unua oficiala lingvo de la lando, pro historiaj kialoj la angla estas nun la plej uzata. La kaŭzoj estas multaj. Dum la Granda Malsato en la mezo de la 19a jarcento, mortis aŭ elmigris (precipe al Usono) grandega parto de la gaelparolantoj, kiuj tiam estis la plimulto en Irlando. Plie, pro la fakto, ke la lando estis dum jarcentoj regata de Anglio, la angla iĝis la prestiĝa lingvo de administrado, komerco kaj edukado, do la irlanda estis malestimata kaj rigardata kiel idiomo de sensciaj kamparanoj. Ĉar milionoj de la posteuloj de la elmigrintoj nun loĝas en Usono, la nord-amerika influo en Irlando estas tiom fortega, ke kelkfoje oni preskaŭ havas la impreson ke Irlando estas, ne sendependa respubliko, sed la 51a ŝtato de Usono.

Pluraj enketoj indikis, ke la plimulto de la irlandanoj ne volas, ke ilia indiĝena lingvo malaperu, sed ne sufiĉe serioze klopodas por plibonigi ĝian endanĝerigitan staton. La aktuala registaro kaj la edukaj instancoj (malfrue) konscias pri la graveco de la situacio kaj asertas, ke ili intencas trovi rimedon por savi la lingvon kaj establi firmajn bazojn por garantiĝi ĝian konservadon.

La rezultoj de la esplorado farita de Magan estis seniluziigaj kaj senkuraĝigaj. Multaj junuloj montris sin indiferentaj. Homoj, kiuj okupis postenojn en kiuj ili devus paroli kaj uzi la lingvon ne povis, aŭ ne volis. Malgraŭ la fakto, ke la irlanda estas ĉie instruita (krom en Nord-Irlando, kie ĝi estas studobjekto preskaŭ nur en katolikaj ler-



Informo pri la urba domo en Dublin en la irlanda kaj en la angla

nejoj), junuloj forlasas la lernejon kun minimuma lingva kapablo. Multaj diras, ke ili ne kapablas legi ĝin. Kompreneble estas esceptoj.

Magan decidis fari aŭdacan esperimenton. Li kompreneble supozis, ke post jaroj da studado devas resti io enprofundiĝinta en la subkonscio de la ekslernejanaj. Pro tio li intervjuis du junajn personojn – viron kaj virinon – kaj petis, ke ili rakontu ion en la irlanda lingvo. Post embarasa paŭzo, ambaŭ silente kapskuis. La virino konfesis, ke ŝi dum dek jaroj studis la irlandan, sed ne parolas ĝin. Ili konsentis submeti sin al hipnoto, dum kiu la sama demando pri rakonto aŭ konversacio estis farita. La juna viro respondis irlande, kvankam heziteme kaj senaplombe. La virino, tamen, flue kaj


ĝuste parolis. Post kiam la hipnotisto ĉesigis la sesion, la paro ree parolis angle.

Mangan ne proponis klarigon aŭ solvon de la lingva problemo, sed certe la eksperimento eble montras, ke restaŭro de lingvo eĉ en kriza stato, ne estas tute senespera klopodo. Grava anglalingva verko, kiu eble povas iom kontribui al ĉi tiu problemo estas *Language Death* (lingva morto) de la lingva fakulo David Crystal, eldonita de la presejo de la Universitato de Cambridge en Anglio. La libro inkludas liston de organizaĵoj, kiuj laboras por la protekto, konservado kaj revigligo de endanĝerigitaj lingvoj, kaj – iom surprize – tiuj inkludas kelkajn sufiĉe gravajn lingvojn kiel la nederlandan.

Garvan MAKAJ

SERBIO

Malnova monumento de la serba kulturo



Frontispicio de la tiel nomata *Evangelio de Miroslav*.

Sendube la plej memorinda monumento de la cirillitera skribmaniero estas la tiel nomata Evangelio de Miroslav (Miroslavljevo Jevandjelje) el la dek-dua jarcento.

Ĝi ekestis je mendo de Miroslav, princo de Hum (teritorio koincida kun la nuntempa Hercegovino) ĉirkaŭ 1185, por servi la bezonon de preĝejoj. Tia libro estis uzata por la mesa liturgio kaj estis aranĝita por legado dum unu jaro. La evangelio estis skribita sur pergame-

no kaj ornamita de 296 miniaturoj. Tiuj miniaturoj estis pentritaj per plumo kaj poste kolorigitaj per peniko en ruĝa, verda, flava kaj blanka koloroj, ornamitaj kun oro. La libro konsistas el 181 folioj, binditaj en ledo, proksimume A3-formata.

La artisma pentraĵo montras kombinon de orient-eŭropa kaj okcident-eŭropa kulturelementoj: bizanca tradicio en la ikonografia ornamiteco de la



serba teksto kaj miniatura stilo, devena de italaj kopiejoj. La pentrada ornamado de la manskribaĵo per tiuj miraklaj miniaturoj kun neniam ripetitaj motivoj el flaŭro kaj faŭno faras la libron majstraĵo, unika en sia speco. La beleco kaj la unika karaktero de la evangelio de Miroslav poste influis aliajn manuskriptojn en la regiono kaj en mezepoka Eŭropo.

La grandvalora dokumento estas en preskaŭ perfekta stato kaj atestas la povon, kiun la kristanaj princoj de Balkanio disponis je la fino de la 12a jarcento.

Dum la serba regado de Aleksandar Obrenović (1876-1903) ĝi troviĝis en la monaĥejo de Ĥilandar en Grekio. En marto 1896 li ricevis ĝin kiel donacon de la monaĥaj fratoj kaj alportigis ĝin al Beogrado. Ĝi estas la plej grandvalora kaj la plej grava dokumento de la kultura heredaĵo de Serbio.

La Evangelio de Miroslav listiĝas en la Internacia Registro „Monda Memoro”, grava programo de Unesko, starigita en 1992. Ĝi postsekvas du aliajn listojn, tiun de la Monda Heredaĵo, kiu entenas jam 851 materiajn objektojn kaj tiun de la „Buŝaj kaj nemateriaj heredaĵoj de la homaro”. La registro „Monda Memoro” celas konservi la kolektaĵojn arkivajn kaj bibliotekajn kaj disvastigi ties priscion. Ĝi enhavas 122 memoraĵojn, inter kiuj tri slavlingvajn evangeliaĵojn: tiujn de Arĥangelsk (11a jarcento), Miroslav (12a jarcento) kaj Ĥitrovo (15a jarcento).

Svetlana MILANOVIĆ

SORĈISMO

La sorĉistin-persekutoj: rerigardo kaj reinterpretoj

De la 14a jarcento kaj dum la sekvaj tri jarcentoj, furiozis tra la okcidenta kristanaro la tiel nomata *persekutado de sorĉistinoj*, kultura kaj socia fenomeno kompleksa kaj karakterizita de perforta subprema aktivado en multaj landoj. Pri la *ĉasado de sorĉistinoj* aŭ pri sorĉistinoj ĝenerale oni diris ĉion kaj la malon. Kelkaj subtenis, ke ili estis ono de esotera religio, sed oni ankaŭ asertis, ke temas pri elpenaĵo, nome projekcio de masklaj fantazioj; aŭ esprimo de „alternativaj” kulturoj. Teorioj marksismaj kaj liberalaj, interpretoj antropologiaj kaj sociologiaj alternadis, akumulante literaturon impresan pro kvanto kaj varieco. En la lastaj jaroj aperis verkoj, en kiuj oni provis enciklopedie sistemigi la malkovrojn kaj la sinsekvajn historiografian debaton; sed la rezultoj ne ĉiam akordis kun la atendoj. Cetero pri la fenomeno „sorĉistinoj” oni publikigas tre multe, sed tro ofte restas ignorataj la plej freŝdataj akiraĵoj de profesiaj esplorantoj kaj interkonsentitaj punktoj de historiistoj.

Bona okazo por kontempli unurigarde la staton de la studoj pri tiu temo estas nun la *Encyclopedia of Witchcraft. The Western Tradition*, prizorgita de Richard M. Golden, (ABC-CLIO, 2007, 4 volumoj). Oni ne alarmiĝu, ne temas pri enciklopedia kolekto de pocioj kaj receptoj, sed pri admirinda ekzemplo de serioza vastigo de esplorado kun interdisciplina karaktero, kiu ricevas kontribuojn de 172 specialistoj el 27 diversaj landoj. Konsiderante la aŭtoritaton de la grupo ŝarĝita kompili la unuopajn „voĉojn” (iuj nomoj: Henry Karmen, Brian P. Levack, Gustav Henningsen,

Andrea Del Col, Oscar Di Simplicio, Gabriella Zarri, Martina Montesano), la verko proponas rimarkindan kontribuon al klarigado pri la fenomeno kaj pri ties dimensioj.



La rolo de la inkvizicio

En la kolosa esploro estas observate, ke se antaŭjuĝoj (*nigraj legendoj*) persiste daŭras ĉi-teme, tio dependas „parte el la fakto, ke la granda publiko

ne havas senperan aliron al la studoj de la specialistoj, kaj parte el tio, ke certaj (mis)informoj utilas al nuntempaj ideologioj”. Inter la miskomprenoj daŭre pludonataj brilas, ekzemple, la rolo de la Inkvizicio, kiu por la plejparto de la publiko enkarnigas la institucion plej respondecan pri la sorĉistin-persekuto. Neniu rajtas nei la gravan influon de la famega *Malleus Maleficarum*, la manlibro por la inkviziciistoj verkita de la dominikanoj Kramer kaj Spenger, nek kaŝi la rolon de la inkvizicio en aliaj subpremaj aktivadoj. Sed ĉi-terene ŝajnas ke la nigraj legendoj devas esti reskribitaj. Fakte oni legas en *Witchcraft*: „La inkvizicio portugala, hispana, romana ne nur baldaŭ hezitis sin makuli per tiu subpremo kontraŭ sorĉistinoj”, veraj aŭ supozitaj, sed konkrete malhelpis „la senkateniĝon de la persekutoj de sorĉistinoj dum la 16a kaj 17a jarcentoj en la sudo de Eŭropo”, kaj tio, laŭ la enciklopedianoj, dependis de la garantiemo praktikata de la inkvizicia jursistemo. Kie la Inkvizicio havis pli da publika influo, kiel en suda Eŭropo, tie pli rapide malkreskis, kvante kaj pune, la nombro de la viktimoj.

Feminisma interpreto

Plue ni legas, ke ĵusaj studoj malfortigas, kvankam ne tratanĉas, la rektan ligan inter la persekuto de sorĉistinoj kaj la ina sekso. Veras, ke la plejparto de la viktimoj estis virinoj, sed veras ankaŭ, ke la „ĉasantoj” interesiĝis pri personoj kulpigitaj pri herezo kaj ne pri virinoj „kiel virinoj”, kaj fakte ne malmultaj viktimoj de la periodaj persekutaj ondoj estis viroj. Sociologia interpreto, iam

en apogeo, kaj subtenata precipe inter la esplorantoj feminismaj, disvastigis la tezon, ke la sorĉistinoj estus la deponejaj gardantoj de la tradicia medicino en opono al la du novaj sociaj kategorioj, kiuj sin profesie ekprezentis: la medicinistaro kaj la klerikaro; la kulpigo pri sorĉado estus reaga sekvo de tiu kultura ŝanĝiĝo. Sed, por konfirmi tiun ĉi hipotezon, iam ege popularigitan, „nenia pruvo” povis trafi ĉi tiujn enciklopedio-verkantojn.

Kiom da viktimoj?

Laste, sed plej grave, ni atingas la plej delikatan temon, la nombron de viktimoj. La kvanto hodiaŭ proponata de la enciklopediaj historiistoj, malgraŭ osciladoj, estas ege malsama je la „ses ĝis naŭ milionoj da sorĉistinoj buĉitaj” paŭse ripetataj de „improvizitaj historiistoj de la persekuto de sorĉistinoj”, kaj eĉ el intelektuloj kiel Emile Zola, kaj ankaŭ tre malsama je la centmilo da viktimoj laŭ la kalkuloj de Voltaire.

La internacia teamo de spertuloj kunigitaj por la verko de R. Golden, skrupule kombinante la datenojn ĝis nun je dispono kaj ilin komparante kun la restaĵo de procesaj dokumentoj en suda Eŭropo, inklinas al la nombro de 30 ĝis 40 000 en ĉirkaŭ 350 jaroj. Kvanto timiga, certe, kiu signas la gravecon kaj la misecon de la fenomeno, kaj spronas al plia engaĝiĝo por plue esplori kaj ĉiam pli ĝuste interpreti. La sama sindeviga engaĝiĝo, kiu postulas ĝustecon kaj klarecon en la disvastigado de la rezulto de la historia esploro kaj ties interpreto – kun la celo ne kaŝi la malsamajn kontrastantajn opiniojn, kiuj dialogas ankaŭ inter la „voĉoj” de tiu ĉi granda „enciklopedio”, kiun en diversaj landoj ie-tie oni recenzis ne sen surprizo. La verko utilos certe por diversaj celoj, ankaŭ por ke la hontega fenomeno okazinta inter evoluintaj modernaj ŝtatoj kaj kristanaj eklezioj ne produktu alian similan fenomenon: la emon kulpigi pri tio nur la „ideologiajn malamikojn”.

Armando ZECCHIN

TEOLOGIO

Pluiras, sed laŭ rifoj, la dialogo inter judoj kaj la katolika eklezio

La lasta rifo ĵus provis obstrukci la vojon en Romo, kaj kun peno, espereble, arkiviĝis. Kiel ie tie sciante, en la liturgia preĝo de la sankta vendredo (kiam oni memoras la morto-tagon de Jesuo), la hebreoj (judoj) dum jarcentoj estis menciataj kiel „perfiduloj” kaj per „hebrea perfido” (latine: *perfidis judaeis... Judaea perfidia*). Papo Johano la 23a forigis tiujn ofendajn esprimojn ankaŭ pro la fakto, ke en la respondaj vortoj en la latinidaj lingvoj la esprimo akiris pli aĉan signifon ol en la origina latina.

En la nova liturgia por la sankta vendredo antaŭ nelonge estis enkondukita nova modifio. Oni nun diras: „Ni preĝu por la hebreoj. La Sinjoro nia Dio lumigu iliajn korojn, por ke ili rekonu Jesuon Kriston Savinton ...”. Antaŭe ĝi sonis: „Ni preĝu por ke la Sinjoro forigu el iliaj koroj blindigon kaj tenebrojn ...”.

Sed jen la insida punkto. Papo Benedikto la 16-a la pasintan jaron permesis, se fidelulaj grupoj tion volas, celebri latinlingve laŭ la antaŭa rito, en kiu ankoraŭ ne estis enkondukitaj la novaj formuloj. El tio rezultis protestoj de judaj komunumoj, kiuj ricevis tujan konsenton ĉe katolikaj aŭtoritatoj, ankaŭ pro tio, ke la novaj formuloj devus esti akceptitaj kaj aŭtomate inkluzivitaj en ĉiuj

preĝformuloj katolikaj.

Sed jen plua punkto. Al judoj ne plaĉis la sekvo de la tradicia sed amendita formulo: „... La Sinjoro favore koncedu ke, per la eniro de la pleneco de 1^a popoloj en vian eklezion, la tuta Israelo estu savita”. Ne plaĉis tio, ĉar en ĝi estas klara aludo, laŭ kristana vidpunkto, al konvertiĝo al la kristana eklezio; kaj el tio sekvis plujaj protestoj.

Por homoj sufiĉe informitaj facilas kompreni, ke tiu formulo similas preskaŭ fotokopie al la tuta similokaza liturgia de la katolika eklezio, ĉar ĝi esprimas la esencon mem de la eklezio. Venis fakte tiasenca respondo (interalie el la vatikana radio, ne tamen el la elsendo en Esperanto). Intervenis kardinalo Walter Kasper ŝargita pri ekumenismo: „Dialogo ĉiam antaŭsupozas, ke oni respektu la pozicion kaj la identecon de la alia. Ni respektas la identecon de la hebreoj: ili do devas respekti la nian, kiun ni ne povas kaŝi. La dialogo sin bazas (...) sur tio kion ni havas komuna kaj sur la malsameco ... Se ne respektata, malsameco detruas dialogon”.

Ĉu solvite? Eble. Kaj dume ĉiam validas la invito de la roma juda komunumo ankaŭ al la aktuala papo, ke li vizitu la roman sinagogan.

Armando ZECCHIN

Nigra apokalipso

Relative populara nuntempe estas ĝenro de literaturo, en kiu la aŭtoro imagas mondon, landon aŭ socion, kiu suferas katastrofon (ne ĉiam difinitan), kaj rakontas la spertojn de la transvivantoj. Oni povas disputi, ĉu tiuj verkoj apartenas al la kategorio fantasta aŭ al la sciencfikcio. Antaŭ nelonge eldonita ekzemplo estas anglalingva romano kun la titolo *The Road* (La vojo), verkita de la usona aŭtoro Cormac McCarthy [kormak makarfi], kiu nuntempe furoras en Irlando.

Krom la postkataklisma medio, la recenzata libro tute malsimilas romanojn kiel la menciita usona. Ĉi tie ne temas pri sciencfikcio sed pri fantasto, kiu iom memorigas pri la groteskaj pentraĵoj de Hieronymus Bosch [jerónimus bos], kun ĝiaj bestoj, monstroj, diabloj kaj turmentitaj estaĵoj. Aliflanke, ĝi similas hororan parodion de la biblia Apokalipso, kaj tiu impresio fortikiĝas pro tio, ke ĉe la komenco de ĉiu ĉapitro estas epigrafo, kiu konsistas el mallonga citaĵo el la Biblio, plej ofte el la libro de la Apokalipso. Tamen, malkiel la intenco de Johano, la aŭtoro de la biblia profetaĵo, supozeble Jorge [jorĵe] Teles ne skribas por edifi aŭ averti la kristanan eklezion.

Malordo kaj obscena krueleco

La konstante ripetita temo de la romano estas *Oni ne plenigas truon per manoj plenaj je nenio*. En ĉiu ĉapitro, krom la deka, kiu konsistas el nur titolo kaj tri vortoj de teksto, unu el naŭ homoj (vira aŭ ina) rakontas sian sperton en terura, hida, ĥaosa socio de malordo kaj obscena krueleco. Post kataklismo kaj dum sinsekvaj militoj, urboj estas detruitaj, popoloj masakritaj, virinoj kaj infanoj perfortitaj, kaj ĉiuj imageblaj specoj de maljusteco kaj brutaleco faritaj. Libroj

estas bruligitaj; scienco kaj tekniko estas forgesitaj. Oni ne plu scias kiel konstrui senĉevalajn veturilojn aŭ flugmaŝinojn. Dumtempe, universala religio regas per metodoj similaj al tiuj de la inkvizicio, nome: persekutado, ŝtiparoj, brulstakoj, torturo, mallibero. Iom post iom, la civilizacio transformiĝas en barbarismon kaj sovaĝecon. La homaro retrovojaĝas en sian propran pasintecon. Je la fino, la homo iĝas sia bestia gruntanta praantaŭulo.

Ĉi tiu eldono estas dulingva: portugala kaj esperanta, sur apudaj paĝoj. Neniu tradukinto estas indikita. Se la aŭtoro de la originala portugala teksto mem esperantigis ĝin, mi iom miras. Kvankam la versio en Esperanto estas bona kaj sufiĉe fidela al la portugala, ĝi ne ĉiam laŭvorte paŭzas ĝin, kaj kelkfoje mi trovis la portugalan pli klara ol la traduko. Sur paĝo 161, la originalaj vortoj *vida tão breve* (vivo tiom mallonga) estas tradukitaj per *baldaŭa vivo*, kion mi ne komprenas. Kelkaj frazoj mankas en la traduko. Ie (mi ne retrovis, kie), la pastroj marŝas antaŭ la armeo, sed ne en la esperanta traduko. Sur paĝo 103 mankas la frazo *Os criados não quiseram incomodá-la* (La servistoj ne volis ĝeni ŝin). Kvankam tiaj mankoj ne influas la intrigon, ili estas partoj de la rakonto, kiuj ŝajnas sufiĉe signifaj.

Bagatelaj malglataĵoj

Komposteraroj estas tre malmultaj, sed troviĝas aliaj etaj malperfektaĵoj. Laŭ la vortaroj (PIV, ktp), *halti* estas ne-transitiva verbo, dum *mezuri* estas transitive, kaj la duan ne-transitive. Eble pri tio oni ne devas esti tro pedanta, ĉar eĉ nia elstara poeto Auld konfesas en siaj notoj al *La infana raso*, ke li transitive misuzis

la ne-transitivan verbon *finti*. (Bernard Golden eĉ argumentas en unu el siaj multaj artikoloj, ke oni ne devus rigore distingi inter transitivaj kaj ne-transitivaj verboj en Esperanto, ĉar tion oni ofte ne faras en nacilingvoj.) Klara eraro sur paĝo 93 estas la traduko *punktaĵoj* por la portugala *rendas* = „puntoj, puntaĵoj”. Eble temas pri tajperaro. Sur paĝo 145 *daŭrigas* devus esti *daŭras*. Tamen ĉi tiuj estas relative bagatelaj malglataĵoj.

Supozeble, la titolo estas intenca ne-tradukebla vortludo, ĉar tia vorto (*Desistória*) ne troviĝas en portugala vortaroj. Eble la aŭtoro kombinis la nocion de la verbo *desistir* (ĉesi) kun la substantivo *história*. Samtempe la prefikso *des-* iom efikas kiel la esperanta „mal-”.

Sango, ŝvito kaj spermo

Sendube, Jorge Teles estas literature lerta kaj bone scias krei verbajn imagojn – eĉ poezie kaj filozofie – en sia patrina lingvo. Kun granda bedaŭro do, mi devas diri, ke mi legis ĉi tiun verkon tute sen plezuro. Krom la materialo mem, la senmajusklaĵaj frazoj estas ofte tiom longaj, ke mi tediĝis. La tekston mi trovis forpuŝa kaj eĉ naŭza. Eble ĉar mi ne plu estas juna, detalaj priskriboj de seksmaj agoj kaj incesto ne fascinas aŭ interesas min. Mi ne volas legi pri sadismo, masoĥismo aŭ brutalaĵoj. La libro ne estas longa. Ĉiu el la du lingvoj okupas nur iom pli ol cent paĝojn, sed por mi, cent paĝoj da sango, ŝvito kaj spermo, tute sen iu ajn mildigo aŭ senpezigo, estas tro.

Garvan MAKAJ

Jorge Teles: *Desistória / Malhistorio*. Dulingva teksto: portugala kaj esperanta. Eld. Fonto, Chapecó, 2007. 235 paĝoj.

Nevideblaj mondoj

La lasta libro de Claude Piron, *Dio, psiĉjo kaj mi*, eldoniĝis nur kelkajn tagojn antaŭ lia forpaso. Ĝi temas pri paroladoj inter psikoterapiisto kaj lia paciento. La lasta havis spertojn de mondo preter nia tempo kaj spaco, al kiu, ŝajne, oni iras post la morto. La paciento ankaŭ parolas pri sperto de Dio. Mi uzos la adjektivon *transa* por tiu mondo kaj ĝia enhavo.

Kompreneble, la terapiisto komence ne povas kredi je la spertoj de la paciento. Li supozas, ke la paciento simple halucinis. La paciento ŝokas lin, persiste nomante Dion „Di”, „amiko” aŭ eĉ „kamarado”. Sed, dum la profesia rilato disvolviĝas, li pli simpatiigas, parte pro tio, ke la resanigo de la paciento estas pli bona ol tio, kion lia profesia lerto povus fari.

La transa mondo estas, kiel ni imagas paradizon; ĝi estas pli bela, agrabla kaj harmonia ol nia mondo, sed tamen similas al ĝi. Ĉi tiu ideo devus fortigi la esperon de ricevemuloj pri sia morto. Tamen la libro ne ignoras la malfacilajn aspektojn de la spertoj. Antaŭ la unua vizito al la transa mondo, la paciento havis teruran sperton esti torturata en fora lando. La unua sperto de amikiĝo kun Dio estas bezonata, por ke la paciento faru grandan lukton kontraŭ la plej malbonaj aspektoj de sia naturo kaj eĉ kaŝita malamo kaj timo al Dio. Li bezonas dian helpon por venki. Poste, antaŭ siaj „vojaĝoj”, li bezonas diri tradician preĝon por protekti sin mem.

La karaktero de Dio en la libro kaj la bildo de Dio en kutimaj religioj interkovras pri la plej gravaj karakterizaĵoj, kiel amo kaj respekto por la homa libera volo, sed la transa Dio ne havas pli primitivajn karakterizaĵojn kiel perforton, koleron aŭ venĝon. La libro tial povas fortigi la piecon, kiu tamen komfortigos nek fundamentistojn, nek skeptikemulojn. Sed ĝi eble povos esti bona influo

en nia mondo. Ĝi kuraĝigas la esperon, ke la perfekteco de la transa mondo realigeblos ĉi tie en la estonteco. La spertoj, priskribitaj en la libro, similas al la spirita sperto de Piron mem, pri kiu la verkisto parolis en intervjuo. La sperto de Piron igis lin lasi la okupon kiel tradukisto en la UN kaj iĝi psikoterapiisto.

Proksime al la fino *Dio, psiĉjo kaj mi* mencias libron, verkitan de Claude Piron dek jarojn antaŭe: *Tien*. Mi hezitus rekomendi ĝin al ĉiuj, certe ne al neplenkreskuloj, ĉar ĝi enhavas scenon pri samseksatako al infano. Laŭ mia opinio, tiaj detaloj plej diskutindas nur en klinika kaj profesia kadro aŭ kompanio. Tamen, leginte la libron, oni povas kompreni la bonajn intencojn de la verkisto.

Tien, same kiel *Dio, psiĉjo kaj mi*, temas pri mondo pli bela ol la nia, kaj kutime ne alirebla, kaj atingebla nur per kaŝita pordo, en dezerta roko, ŝajnanta mistere trans-dimensia. Tamen la mondo, al kiu ĝi kondukas, ne estas la transa mondo en *Dio, psiĉjo kaj mi*, sed paralela fizika mondo, kiel ideala ter-mondo. Efektive, la praavoj de ĝiaj loĝantoj devenis de nia mondo. Ĝiaj loĝantoj povas suferi kaj morti, sed pro la apliko de sia saĝo, la sufero *tie* estas minimuma kaj la boneco, feliĉo kaj harmonio maksimuma. La loĝantoj estas rekoneble homecaj. Do la Edeno de *Tien* montras realisme idealan mondon, kiun homoj povus krei. *Tie* la rakontanto resaniĝas de traŭmo, kaŭzita de lia terura sperto de atako dum lia infaneco.

Pli ol unu homo iras *tien*, informite de vizitintoj, kompreneble, skeptikemaj sen propra sperto. Dezirante reveni al nia mondo, havante respondecojn ĉi tie, ili ne povas resti pli ol tri tagojn *tie*. Tamen kelkaj restas, ŝajne malaperinte de nia mondo. Unu *tieulo* malsaĝe sekvas revenantajn vizitantojn kaŝite, kontraŭ ilia konsilo, kaj suferas multe en nia moderna mondo antaŭ ol reveni *tien*.



Tien reklamas sin mem ficcia, escepte de la rakontanto. Sed estas interese demandi, kiom da vereco povas esti en la libro. Eblas, ke la libro enhavas elementon de aŭtobiografio: ke la verkisto skribis pri la spertoj de li aŭ de liaj pacientoj. Kompreneble, rakonto pri kaŝita paralela Edeno, alirebla de nia kutima mondo per transdicensia pordo, similas scienc-fikcion pli ol la mondo, en kiu ni vivas. La rakontanto demandas sin ĉe la fino de la libro, ĉu Zamenhof povintus viziti *tien*, pro la uzado de esprimoj en la himno *La Espero*, „nova sento” kaj „sankta harmonio”, kiu harmonias al la vortoj de la estro de *tie*. Iu alia en la rakonto tuj sugestas, ke pli ĝusta klarigo estas simple inspiro al la kreinto de nia lingvo.

Bedaŭrinde, Claude Piron estas ne plu inter ni, kaj neniam plu eblos paroli kun li pri lia romano. Tamen sur ni estas la respondeco, krei nian propran paradizon en nia mondo. Kiel la himno diras: *Ĝis la bela sonĝo de l'homaro, por eterna ben'efektiviĝos!*

Miland JOSHI

Claude Piron: *Dio, psiĉjo kaj mi*. Eld. IEM, Vieno, 2007. 173 paĝoj. ISBN 9783010000369.

Prezo ĉe FEL: 16,50 eŭroj + afranko

Claude Piron: *Tien*. Eld. IEM, Vieno, 1997. 139 paĝoj. ISBN 3901752129.

Prezo ĉe FEL: 12 eŭroj + afranko

Ĉu ŝtormo en tetaso – aŭ en ambono?



De nia surloka korespondanto, vole-nevole troviĝante en la frontlinio.

Post la aŭtoro Salman Rushdie [raŝdi], post la dana karikaturisto, kiu bildigis la profeton Mahometon, post la nederlanda parlamentano kaj filmisto Geert Wilders, kaj Papo Benedikto,

nun evidentiĝas, ke en Dendermondo en Belgio oni jam de 1685 insultas la profeton. La turka ĵurnalo, Yeniçag, en sia frontpaĝo, do alvokas al kontraŭago.

La afero tielas. En la ĉefpreĝejo de la malnova flandra urbo Dendermondo estas ambono, kaj la ambonan kuvon portas du anĝeloj. Fakte mi devus skribi anĝelinoj, ĉar laŭ la ĵurnalo temas pri

virinaj anĝeloj. Mi devas konfesi, ke miaj okuloj ne plu estas kiaj antaŭ kvindek jaroj, kaj do mi ne povas malkovri atributojn, kiuj certigas la sekson de la bildigitoj. Verŝajne la ĵurnalista agis laŭ la zamenhofa konvinko, ke io bela nepre estu ina.

Herezo

La anĝelinoj piedpremas iun viran (nepre, kun atributo, ĉar estas barbuĉo) homon, kun orientaspekta ĉapo kaj kun dika libro inter la manoj. Kiam mi ĉiĉeronis en la preĝejo, mi ĉiam klarigis, ke la homo estas Mahometo, kaj ke la anĝelinoj surtretas lin pro lia herezo. Tiel mi lernis de miaj antaŭuloj. Fakte la ambono estas granda, kaj belega, skulptaĵo.

Ĉu esti aŭ ne esti? Jen la demando! diris Ŝekspiro, sed Hamleto troviĝis antaŭ malpli grava historia konflikto. Nun specialistoj kaj politikistoj en Belgio kurbiĝadas kiel diablo en akvo benita, por pruvi siajn tezojn. Kontraŭislamanoj kompreneble vidas en la libro Koranon, eĉ se neniu teksto aludas tion. Aliflanke pacemuloj havas centojn da kialoj por esti certaj, ke nepre ne temas pri Mahometo, sed eventuale pri iu imamo aŭ iu muftio.

En la tempo de la skulptado de la ambono la islamaj turkoj estis la granda malamiko. En 1683 ili la duan fojon sieĝis Vienon, kaj Eŭropo tremis pro la islama danĝero. Laŭ specialistoj, kiuj studis la vestaĵojn kaj la ĉapon de la kuŝanto, la figuro povus esti persa.

Tabua libro

Tamen ankaŭ la danĝero de Lutero (mortis 1546), kaj de Kalvino (mortis 1564), ambaŭ ankaŭ grandaj libroamantoj, almenaŭ bibliamantoj, ne estis tiom longe for. Unu el tiuj povus esti la subulo, la subanĝelina. Ne forgesendas, ke kontraŭ ĉiu logiko, por katolikoj, la Biblio, kvankam sankta, estis granda tabuo.

Tiamaniere ambaŭ flankoj klopodas ĵeti oleon: iuj sur la ondojn por ilin trankviligi; aliaj sur fajron por plivigliĝi ĝin. Ekstremdekstruloj jam vizitis la preĝejon por admiri kaj laŭdi la skulptiston, Mattheus van Beveren. Estas nekredible, kiel homoj perdas absolute ĉiun racian diskutkapablon kaj restas nur kun disputkapablo, kiam temas pri ideologiaj (interalie religiaj) temoj.

Nur Mattheus, jam delonge forpasinta, povus rakonti, kion aŭ kiun li intencis bildigi. Nu, kion ni facile povas imagi, nepre danĝeron aŭ malamikon de la sola unika vera kredo. Li lasis neniun skriban klarigon aŭ ĝi perdiĝis, sed mi supozas, ke neniam estis skriba klarigo. Ĉu oni do intence forgesas, ke ĉiuj tiaj bildoj estas fantaziaj?

Patrono

En la preĝejo estas belegaj pentraĵoj de David Tenier, restaĵoj de triptiko, kies ĉefa centra parto perdiĝis, kiuj prezentas la patronon kaj patroninon de la urbo, Sankta Hilduardo kaj Sankta Kristiana.

Nu, ĉu vere ili tiel aspektis? Ili tielas simple pro volo kaj vorto de la pentristo, kiu ilin imagis.

Ankaŭ sur la turo de la urbodomo, kiel duopo inter la 16 statuetoj ornamantaj la fasadon, figuras Hilduardo kaj Kristiana. Tie ilia fizionomio estas alia. Kiu pravis? Neniu el ambaŭ, kompreneble. Nu, ĉu de Mahometo ekzistas pli fidindaj fotoj? Nu ja, nur la intenco gravas, sed ĉu pro malŝatata intenco oni rajtas mortigi kontraŭulon? Kaj mi tre dubas, ke la intenco de Mattheus vere estis insulti la profeton.

En la sama preĝejo troviĝas unika trezoro, romanika baptujo el la unua duono de la dekdua jarcento. Estas el kalkŝtono de Turnezo (Tournais). Skulptita sur ĝi estas la Lasta Vespermanĝo, kun naturfidindaj bildoj de la apostoloj kaj de Kristo, sed ankaŭ alia interesa bildo: temas pri duobla bildo.

Ŝlosiloj

Maldekstre estas Saŭlo, vestita en maŝkiraso, falinta sub sia ĉevalo, survoje

al Damasko. Dekstre estas Sankta Petro, tute fidela laŭ aspekto, kun du ŝlosiloj (jam tiam oni kutimis zorgi rezervon) kaj la Sankta Seĝo ĉe la Pordegoj de la Ĉielo. Interese estas konstati, ke la ĉielo aspektas kiel araba kastelo. Ĉu tiu bildo ne povus servi kiel kontraŭpezo?

Ni ne povas legi la intencojn de la skulptisto kaj ni ne konas la intencojn de kritikantoj kaj defendantoj. Aŭtoro ofte sin kaŝas sub fremdaj bildoj kaj fremdaj tekstoj. La aŭtoro de tiu ĉi teksto ne deziris miksi sin en jes-aŭ-ne-diskuto pri Alaho kaj lia profeto.

Kredeble tamen li volis verki tekston larditan de tipe esperantaj esprimoj, por kontraŭbatali la ŝatatajn samideanojn, kiuj trovas, ke Esperanto estu ekzakta matematika ĉiopersimemklariga lingvo, sed kiuj senprobleme, uzas „trovi” en la senco de „opinii”, „pensi”. Homoj, en ĉiuj lingvoj, ofte uzas samajn vortojn por indiki tute malsamajn aferojn.

Petro DE SMET'



ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afranko.

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”


Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

07

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Reteto: www.retbuto.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Vizitu Ipernity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

27 EUR
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronštejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloj

Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj "Lastaj poemoj" sed ne malmultaj scios ke post tiuj "lastaj" li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

- Paĝoj: 288 • Formato: 135 x 205 mm • Eldonjaro: 2008 • Serio Stafeto n-ro: 32
- Pezo: 333 g • ISBN: 978-90-77066-33-1 • Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be